

Michelangelo Buonarotti,
La venko de l' amo super la morto

tradukita de Manfred Retzlaff

Forpasis ino, kiun mia koro
Sopiris, ege bela de figuro,
Laŭ la decid' ĉiela. La naturo
Ja hontis, vidis ĉiu ŝin kun ploro.

Ho, kie vi nun estas? Detruite
Forsinkis ĉiuj songoj de l' espero.
Nun estas via korpo en la tero,
Sed restos enĉiele vi spirite.

Vi devis morti kiel ĉio dia,
Veninta sur ĉi tiun teron iam.
La morto tamen vin ne neniigis!

Vi vivas, hele brilas gloro via,
Malvualite vi montriĝos ĉiam
En tio, kion vi efektivigis.

*Traduko de la itala poemo "La vittoria di amore sulla morte" de MICHELANGELO BUONAROTTI (*1475-03-06 – †1564-02-08) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-996-2012 (2014-04-21 14:32:04)

Tradukita en Esperanto de Manfred Retzlaff (Manfredo Ratislavo) en Oktobro de 2000 laŭ la germanigo fare de Grimo, Hermano (Hermann Grimm, 1828 – 1901). Pri tiu vidu la vikipediejon http://de.wikipedia.org/wiki/Herman_Grimm.